

ĈEĤOSLOVAKA
ESPERANTO
REVUO

JARO XIV. NRO 6.
JUNIO 1932.
APERIS 15. VI. 1932.

la **progreso**



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO EN OLOMOUC.

Esperanto-Arbo. Zamenhof-strato. 260 kongresanoj.

En la Bulteno de tiu ĉi numero trovas la leganto protokolojn pri la kongresaj kunvenoj. Ni ripetu sur tiu ĉi loko la deziresprimon de la kongreso, ke esperantistoj atente legu ilin, pridiskutu kaj primeditu ilin kaj provu trovi inter la opinioj esprimitaj, kritikitaj kaj rekomenditaj ion, kion ili povus apliki en ilia poresperanta laboro. Sed ni ankaŭ diru, ke la kongreso mem per aktiva partopreno de multaj kongresanoj en la kongresaj laboroj kaj per rimarkinde varma atmosfero kreata per sincera volo de ĉiuj, ke nia movado plifirmiĝu kaj plivastiĝu, multe helpis al kresko de la fido, ke ni iras ĝustan vojon. Multon helpis ankaŭ tre bona aranĝo de la kongresa ekstera kadro, ŝuldata al la loka komitato, kiu povas esti tre kontenta pro rezultoj de sia laboro. Ni raportu tie ĉi pri kongresaj aranĝoj ekster la kunsidoj.

La plej grava esti Plantado de Esperanto-arbo. Ĝi estas nuntempe malgranda arbeto de Liliodendro. Apud ĝi staras tre impone aspektanta granita bloko, sur kies unu flanko estas la jena teksto:

ESPERANTO-ARBO

Plantita la 15. V. 1932 de la V-a
Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso
por honorigi la verkon de Dro L. L. Zamenhof.
Tiam estis prezidanto de la respubliko
T. G. Masaryk,
Urbestro de Olomouc Dro R. Fischer.

Internacia Centra Komitato de Esperanto-movado
Universala Esperanto-Asocio en Genève
Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
Germana Esperanto-Ligo en Ĉ. S. R.
Oomoto Ajabe Kameoka, Japanujo,
Universala Homama Asocio Paris
Internacia Cseh-Instituto de Esperanto Haag
Internacia Polica Ligo
Moraviaj Esperanto-Pioniroj
Esperanto-lernejkursoj Neředín
Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉ. S. R.
Esperantista Regiona Ligo Český Těšín

Esperantistaj societoj, kluboj kaj grupoj en
Olomouc, Bratislava, Brno, Hradec Králové,
Kladno, Kolín, Košice, Emo-Orlová, Praha,
Přerov, Vera Paco-Spišské Vlady,
Prostějov, „Comenius“ Tisovec

Fondis Esperantista Societo, Olomouc.

La ceremonio komencis per la ŝtata kaj esperanta himnoj kantataj de la loka kantista unuiĝo „Dekseso“. Poste A. Kudela en nomo de la iniciatinta societo informis pri intenco de tiu rememoriga faro. Reprezentanto de la urbo urba konsilanto dr Václavek, esperantlingve deklaris ke la urbo Olomouc akceptas la arbon kaj la memorŝtonon en sian protekton kaj zorgon. Poste la delegitoj de esperantistaj societoj ŝutadis teron al la arbedo. La unua tien metita estis tero el Nederlando, lando, kie kuŝas Komenský en tombo, la dua — tero el ĝardeno de la palaco de Ligo de nacioj, sendita de UEA. Poste el Palestino (Roof), Polujo, Tatry, Bratislava, Košice, Trenčín, Moravská Ostrava, Uherské Hradiště, Vyškov, Prostějov, Přerov, Praha. La ceremonio estis finita per danko de la kongresa prezidanto Kamaryt al la urbo Olomouc, kies urbestro Fischer ĉeestis.

Poste iris la tuta granda aro de kongresanoj kaj de publiko al la strato, kiu estis nomigita laŭ *Zamenhof*. Post parojoj de Kudela kaj dr. Václavek oni forigis verdan flagon de la strata ŝildo. La strato estas nova, ĵus konstruata; ĝi estos unu el gravaj stratoj de la urbo.

Vespero dimanĉon estis plenigita per programo de recitaĵoj (Mi salutas Vin, Preĝo sub la verda standardo), komikaĵoj (Mia amido, Klera sinjorino), kantoj (Lulkanto el Hubička, Rozeto en herbejo, Fluas akvo, La filio), muziko (triopo de citristoj), danco (humoraĵo de Dvořák, poemo Verda stelo), marioneta sceno (Kaĉjo — Ĉemeta instruisto). La programo ne nomis ĉiujn aktorantojn. Ni citu do por la rememoro almenaŭ tiujn de la presita programo. Kantis s-ino Blaťná, je piano ludis s-ino Chmelařová, je cifroj muzikis s-ino Unger, f-inoj Bártová, Brejšchneiderová, dancis f-ino Polášková. Kaj ni ne forgesu la plej junan kongresanon la 4 kaj 1/2-jaran Luĉjon Neoral kiu aktive partoprenis ne sole la kunsidojn, sed ankaŭ la koncerton. Reĝisoro de la programo estis s-ro Neužil. Ĉiuj aktorantoj ricevadis bruan sinceran aplaudon. La prezentataj tekstoj estis ĉiuj en esperanto.

Dum interkonatiĝa vespero

sabaĵon prezentis diversajn scenojn, jen ĝajajn jen sentimentalajn la lernantoj de la lernejo de s-ro Neužil. Estis kortuŝe vidi ilian naivan fervoron.

Promeno tra la urbo dimanĉon post la 18-a okazis en rapida ritmo. Ĝi estis surprizo por multaj. Ne sole neatendita abundeco de vidindaj panoramoj kaj arkitekturoj, sed ankaŭ la gvidanto mem. Mezaĝa sinjoro rapidas kun ni tra la urbo, ĉar oni devas plenumi la programon, kvankam la laborkunveno estis daŭrinta unu horon pli ol estis laŭprograme. Se vi lin aŭskultas plurajn minutojn, vi komencas miri: li ne sole estras la lingvon, li same estras la diversajn teknikajn detalojn pri arkitekturo kaj historio de la urbo. Sed li scias tion rakonti kaj klarigi laŭ maniero kiu evidente superas la kutiman nivelon. Se vi lin aŭskultas pli longe vi trovas, ke li estas eminenta kunulo, kun kiu vi volonte sidus ĉe glaso da vino. Kaj vi finas tiun konatiĝon kun ĝoja konstato, ke ankaŭ en nia movado ekzistas eminentuloj nekonataj, kiuj eminentas pli ol la konataj.

Esperanta prediko de paroĥestro Macek el Lednice lundon matene kunvenigis multajn kongresanojn en preĝejo de Ursulaninoj.

Solena tagmanĝo lundon en Národní dům kontentigis ĉiujn same pro nekara menuo kiel pro amika humoro de tostoj.

La ekskurso al Bouzov lundon posttagmeze tre plaĉis.

Alia parto de kongresanoj sekvis inviton de s-ro lernejestro Neužil por viziti lian lernejon kaj vidi tie lian esperanto-instruadon. Li kunvenigis 17 siajn gelernantojn (ĉirkaŭ 9-jar.) kaj li donis provlecionon de la instruado pri kazoj, pri prepozicioj, pri pronomoj kaj pri stilo. Ĉiuj liaj gastoj miris, kiel lerte s-ro Neužil klopodas uzi metodojn de la aktiva lernado en sia lernejo. La entuziasmo de liaj lernantoj estas miriga. S. K.

Máte již Filipův slovník esp.-český?

Brož. za 40 Kč, váz. za 50 Kč.

HELENA ĈAPKOVA:

LA ĈERIZA MIRAKLO.

Nenio konvinkas tiel ĉarme kiel mirakloj de la amo, se ili estis bone ple-numitaj en ĝusta tempo. En la legendoj pri pasintaj epokoj estas pri tio sen-nombraj pruvoj.

Bedaŭrinde ne plu okazas tiaj similaj mirakloj kaj malofte fariĝas, ke kolerego ne atendite ŝanĝiĝas en bonvolecon. Longe, tro longe oni jam ne aŭdis pri nova ĉerizfesto, simila al tiu, kiun tradicias al ni legendo.

Jen, ĝi komencis per promorta timo. La gardistoj sur la urbomuroj ekaŭdis el ie obtuzan bruegon, el tro malproksime, el abismo de la nokto kaj iom post iom ekbriletis sur la horizonto kurba vico da lumoj, serpentumanta kaj plilongiganta kiel fosforeskanta serpento. El malproksimo sonis izolaj raŭkaj voĉoj kaj kvazaŭ pluvego bafadis en kupran kaldronon, tiel frapadis senombraj hufoj de ĉevaloj la sekigitan grundon. En matenkrepusko oni ekbatis la sonorilojn kaj la urbo vekigis por ekvidi teruron kaj morton.

Jen ne estis militaj vefuriloj, kiuj estis kunigitaj ronde ĉirkaŭ la urbo en minacantan majestatan digon, sed facile movigeblaj fortikaĵoj sur radoj, hirtigitaj per fero. Kien ajn la okulo rigardis, ekestis arbaro da lancoj, da batilegoj garnitaj per najleĝoj kaj da teruraj dentumitaj falĉiloj, kaj inter ili faŭkis la rondaj buŝegoj de haŭbizo, direktitaj al la mezo de la urbo, malbone ŝirmita. Sed el ĉio plej minacaj estis la minacantaj vizaĝoj de la venĝantoj. Ili venis el malproksimo, dumnokte ŝtelvenis, postlasante ruinojn kaj dezerton. Pro kolero ardigitaj ili eliris el murdo kaj incendio kun cikatroj kaj skrapaĵoj, kiujn postlasis sub la leda kamizolo la flameco de kruelaj vundoj. Tiel ili ekmarŝis post la malamiko, por venĝi sian patran landon, elrabitan, atakitan senkaŭze.

Oni sciis pri ili, ke ili neniam indulĝas, kaj la urbanoj ekkonis, ke ili estas perditaj.

La komandanto ne akceptis la deputation de la urbanoj proponanta kon-

tribucion. La timega lamentado de la urbo superonis la bruon de bataliloj kaj vefuriloj ekirintaj antaŭen: hrr al ili, batu kaj buĉu, neniun indulgu! La urbo iĝis muso inter etenditaj piedegoj de malsata kato. Ho, ke la urbomuroj povu forŝoviĝi malantaŭen kaj amasiĝi ĝis alteco de turo, por ke ne superfluigu ilin la malamikaj pafaĵoj!

La venĝantoj ne rapidis. Neniu ja povis forkuri. La tutan ebenaĵon ili pleniĝis, kaj indiferentaj ili promenis inter la grenkampoj. El la urbo oni multe povis vidi surmetadon de drataj ĉemizoj, similaj al rustaj retoj, alkroĉadon de dufrancaj hakiloj al la ledaj zonoj, forte ligitaj ĉirkaŭ la koksoj. — Ne, ne estis eble elporti la teruran streĉon antaŭ la sanga juĝo. Mankis nur la muĝanta bleko de la trumpetoj de l'lasta juĝo, por ke fendigu ĉiuj pordegoj per fero garnitaj kaj enmanigu al venĝo la kriantan urbanaron. Jen estis momentoj, kiam la virinoj ĝemas kiel mortantoj, enigante la fingrojn, per teruro akriĝitajn en la ŝultrojn de la edzoj kaj freneze al si premas la senkulpajn kapetojn de l'infanoj; momentoj tro pezaj, pli turmentaj ol la morto mem kaj estis senmezura doloro, plilongigi ilin nur per ununura momento.

Tiel sentis ĝin la virinoj kaj decidiĝis al ago senekzempla:

„Vi etulo,
vi iros antaŭ ĉiuj,
dirante al ĉiuj vortojn, kiujn ĉiu konas,
kantante al ĉiuj
vortojn, per kiuj oni enlulas
kaj pro kiuj oni esploras kaj poste
ekdormas.
Kaj al vi, etulo, mi faros larĝajn ŝultrojn
per granda mantelo, per amo brodita.
Viaj piedoj estos pli malmolaj ol la
silikejoj sur la strato,
viaj manoj estos pli dolĉaj ol fruktoj
en la ĝardeno.“

(Georges Duhamel.)

La unua brulanta pajlofasko, ĵetita en la urbon, ne kaŭzis malutilon, sed ŝtona kuĝleĝo jam, falinta sur la urboplacon, mortigis plorantan maljunuli-

non, ĝuste kiam ŝi faris krucsignon, kvazaŭ ŝi ion benus.

La unua atako kontraŭ la urba pordego havis sekvon, ke ĝi malfermiĝis libervole. Sed ne kontraŭatakis el ĝi trupo da viroj al morto deciditaj; — kaj la lancoj, batilegoj kaj terure dentumitaj falĉiloj de la venĝantoj ne ekŝiblis super iliaj kapoj: konfuze, necerte kaj sencele ili ekkrakis, haltigitaj en lasta momento, antaŭ ol ili devis ekbati — sur la florkrone ornamitan kapon de gracila svelta knabineto. Turmentita per angoro ŝi elvenis, kvazaŭ blanka fantomo, en solena vesto, ho tiel simila al mortotuko, — sed brave ŝi svingis verdan branĉon kaj iomete returnis sin, por altiri je mano knabeton plenforte krietantan, kiu kontraŭstare apogis siajn piedetojn al ŝtona sojlo, sed poste ekriĝardegis per okuloj pro timigo blindaj kaj tuj prefere ilin kovris per la malvarmeta floranta branĉo, kiun li havis en la mano. — Kaj jen ili amase elvenis. Venis infanoj apenaŭ paŝetantaj, terurigitaj spirantaj pro timo, kun vizaĝetoj ankoraŭ malsekaj pro la lastaj patrinaj kisoj; sekvis vico da knaboj mutigitaj pro konsterno, kaj knabinoj mallauĝte plorsingultantaj. Ho, tio ne estis procesio de vivaj infanoj, pli vere tio estis ŝafidetoj senditaj al la oferbranĉo.

Jen rigardu, jam ĉiuj elvenis, eĉ la lasta bedaŭrinduleto ŝanceliĝas pene sur kurbaj kruretoj kaj kondukas grandan blindulinon. Neniu ilin gvidas. Nur hirta hundo furioze bojas kontraŭ la fremdaj viroj, kvazaŭ ĝi volus averti sian malgrandan sinjoron, ĝi, la ununura kuraĝulo de la tuta urbo.

Ili serĉis kaj trovis la komandanton, la timigan, per venĝo malgajeĝan viron, kaj laŭ ekzemplo de la unua paro ili ekĝenuis kun klinitaj kapoj, kvazaŭ ili nun atendus la baton, kaj nur la manoj, etenditaj manoj svingis la branĉojn, kvazaŭ ekmuĝetus flirtanta malalta arbareto ĉe liaj piedoj. Tiel ili mute restis, sed la vila hundaĉo, ne sentante sin timigita per tiom da fremdaj odoroj, trakuris la vicojn kaj albojis, furioze ŝanceliĝante sur siaj malgrasaj piedoj, la grandajn botojn de la ĉefkomandanto. La lasta ne levis la boton por forpuŝi la hundaĉon, sed

inter lia nigra barbo malrapide aperis rideto, duone ne decidita, duone afabla, li disetendis siajn brakojn, kaj kliniĝis por pli bone rigardi, kaj ekvidis la delikatajn nuketojn, kovritaj per eta lanugo kaj ŝajnis al li, ke li aŭdas la rapidan korbatadon kaj sentas la grandan infanan angoron. Jen li ekhontis iel, ekzorgis kaj diris per nekomprenebla lingvo: „Ekstaru infanoj, kaj ne timu!“ — Ili ne komprenis kaj ne kuraĝis levi la konfidemajn okulojn. Eble estis tondra lia voĉo, kufimigita komandi virojn, ĝi sonis pli vere kiel malbeno aŭ kondamno al morto. Tial ekkonsciĝis la ĉefo de la venĝantoj pri la situacio kaj kvazaŭ senvole ĉirkaŭrigardis; lia rigardo fine ekhaltis ĉe ĉerizarbo abundanta per maturaj fruktoj. Li aliris, levis la grandan, per feraganto vestitan, manon, rikoltis plenmanon de tiuj dolĉaj fruktoj kaj proponis ilin al la plej proksime genuantaj infanoj. — Jen, ne plu necesis vortoj. Al la mirigitaj rigardoj el ĉiuj direktoj respondis bonkora hezitema rideto kaj post mallonga prokrasto ĝaja familia bruo ekestis en la tendaro. La infanon, kiu falis pro sia tro longa vesto, zorgeme levis vila vira pugno. Knabo, kuraĝe staranta, konfide prenis la proponitan al li manegon, por povi pli alproksimiĝi al ĉevalo, ligita ĉe paliseto. Ankaŭ la knabinoj ĉesis tremi kaj patrine ariĝis ĉirkaŭ la plej malgrandaj; eĉ la kripluleto sur kurbaj kruroj kun la granda blindulino feliĉega eksidis inter ili.

Tiu konfido de la malgranduloj senarmigis la militistaron. Ne daŭris longe, de ie oni alportis plenan korbon da ĉerizoj; grandajn panbulojn kaj poton da mielo. La hirta hundo singarde eksidis ĉe sia malgranda mastro kaj juste ĉiam eklekis, kiam tiu prezentis al ĝi sian dolĉan pantranĉon, unue la mastro, poste la hundo. — Blonda knabineto apogis sin konfide al la genuoj de barba viro kaj je demando en fremda lingvo ŝi tuj respondis: „Anna“, ludeme enigante la maldikan fingreton en grandan trahakitan truon de la leda kiraso, ĉirkaŭitan per neregule disfluinta makulo, — per tiu truo eble iun forlasis la vivo. — Per ambaŭ manetoj ŝi ĉirkaŭprenis la manradikon, antaŭ mo-

mento ankoraŭ armitan per glavo; kaj alia knabino trankvile ripozis sur brako: li ja ne estis malbona viro, li estis paĉjo de ie malproksime kaj babilis al ŝi longe kaj multe; eble li rakontis beleĝan fremdan fabelon.

Sed el la malantaŭo de la tendaro venis malgaje rigardantaj viroj, multaj eĉ alpaŝis la komandanton kaj admonis lin per gestoj. Tiu tamen ekstaris kaj per unu movo de sia fera brako li savis ne nur la infanojn, sed ankaŭ la urbon. Poste li metis sur ĉevalon malgrandan knabon, ridantan, per ĉerizoj malpurigitan, kaj la bridon li metis en manon de la plej malgaje rigardanta viro. Ho, kiel tiu grumblis kun intenca impertinenteco kaj rifuzante forŝoviĝis, — sed li ne flankeniĝis, kiam ĉe la unuaj paŝoj de l'ĉevalo fidele sin apogis sur lian ŝultron eta gluceca maneto, li eĉ kaŝe malantaŭen rigardis, ĉu la etulo ankaŭ sufiĉe sekure sidas kaj jam ne formoviĝis el la proksimeco. Jen la komandanto sin forturnis por kaŝi rideton. Tiam li ekkomprenis la grandan potencon de la infanoj. Eĉ la plej obskura ne povis kontraŭstari kaj kaŝe, por ke aliaj ne vidu, li kliniĝis al la malgrandaj pro vivo petantoj, por mem ĝojigi ilin kaj protekti. Tiel okazis, ke en la tuta tendaro de l'venĝantoj ne estis unusola mano, kiu emus ataki la infanojn elmetitajn al la terura pereco. La senpoveco kaj konfido de la senkulpuloj aliĝis al paĉjoj la severajn virojn kaj militistojn. Kaj kiam ili formarŝis, postlasante satajn infanojn, bruantaj kaj petolantaj ĉe la pordego, singarde sin malfermantaj, kelkiu el la forveturantaj severuloj rerigardis kaj nur nevole rapidiĝis la ĉevalojn. El la lasta veturilo eĉ elsaltis barba grandegulo, kiu devis longan vojon returnen kuri, por reveni al la antaŭpordega loko, kie li inter la amaso da ĉerizkernoj ekvidis la kolorradiajn fajn longajn rubandojn de la kroneto, kiun havis surkape la knabino-gvidantino. Ekridetante li levis ĝin kaj per ĝi ornamis sian longegan lancon. Poste li longe devis postkuri la veturilojn ĝemantaj sub la ŝarĝo kaj krakbruantaj sur la malbona vojo gvidanta hejmen.

El la ĉefo: L u d. K r y s t a.

Senarmigo kaj Eduko.

„La Konferenco pri senarmigo!“ Kiom da homoj atendis savon de ĝi — kiom da homoj male dubis pri ĝia kapableco, doni al la homaro la pacon. Kial dubas ili? Ĉar paco povas regi nur se estas en la homoj pacema spirito. Ĉu estas nun en la homoj pacema spirito?

La homo estas la produkto de sia edukado. La homa estaĵo prezentas „tutecon“: sentojn, intuicio, racio, volo, formas ĝian tutajaĵon. Se unu flanko de tiu estaĵo estas tuŝata, tuj ĉiuj aliaj flankoj kunvibras. Pro tio la ĉiutaga vivo — en la familio, en la strato, en la socia medio — havas fortegan influon sur infanoj, kaj postlasas sur ili neforigeblajn signojn.

Kiel la homo estis edukita en sia infanaĝo, tiel li kondutos en sia maturaĝo. Kaj, ĉar ĉio en nia mondo reagas kaj reefikas, la individua vivo influas la socialan vivon, kaj la sociala la individuan. La tradicia lernejo, per siaj kontraŭ-naturaj, kontraŭ-psikologiaj postuloj, kontribuas al senekvilibrigo de l'individuo, sekve al senekvilibrigo de la socia medio. Ĝi tiel kreas spiriton de malordo, de milito, de senbrida revolucio.

Male la Aktiva Lernejo, permesante al sanaj estaĵoj konservi kaj kreskigi sian korpan kaj spiritan sanon, realiĝus, se ĝi estus ĝeneraligita, socian medion, en kiu milito kaj brutaj perforto aŭtomate malaperus. Kia devas esti vera Aktiva Lernejo, kia devas esti moderna eduko, konforma al la korpaj kaj psikaj bezonoj de infano, kaj al la sociaj bezonoj de la homaro? La respondoj al tiuj demandoj estas priskribitaj kun tiom da precizeco kaj altspiriteco en „Estonta Eduko“¹⁾, verko de la mondfama pedagogo kaj sociologo D-ro Ad. Ferrière, ke pri tio ni ne insistos tie ĉi.

Homoj edukitaj laŭ tiaj principoj kaj metodoj sukcesus trovi solvon al la konfliktoj. Ili eĉ evitus konfliktojn, starigante justecon por ĉiuj — ne sekane, jurane justecon, sed justecon kiu certigus al ĉiu laboranto tion, kio estas necesa por vivi sane kaj por ĝui vivon, justecon konsistantan el amo kaj kiu elvokus amon, laŭ la plej alta senco de tiu ĉi vorto. Tiam ne necesus plu „Konferenco pri senarmigo“, ĉar spontanee la homoj ne tolerus plu militon, nek armigon.

H. I.

1) Ad. Ferrière, Doktoro en sociologio, Estonta Eduko, Alvoko al gepatroj kaj edukestraroj, el „Transformons l'Ecole“ tradukis H. Danneil. Eldona Servo de U. E. A., 1, Tour de l'Île, Genève, 1929, 1 vol. 72-p., prezo 1.50 sv. fr.

Babelaj turoj en Afriko. Ankaŭ negroj havas rakontojn similajn al la fabelo pri la babela turo. E. Jacoffet rakontas legendon, ke dio Njambe suprengrimpis sur araneaĵo en la ĉielon kaj ordonis al la homoj, ke ili adorkliniĝu antaŭ li. Sed la homoj diris inter si: Ni iru pis supren, sed antaŭ ol ili atingis la ĉielon, fortajn palisojn en la teron, alligita al ili aliajn, ĝis alta turo estis konstruita. Sur tiu ili grimpis supren, sed antaŭ ol ili atingis la ĉielon, la turo disfalis, la homoj terenfalas kaj mortigis. Ankaŭ la germana esploristo Hamberger rakontas pri afrika babela turo. Negroj el Wakulwe rakontas, ke la homoj foje volis atingi la lunon kaj pro tio ili amasiĝis arbon sur arbon; la provo estis vana, la homoj malsuprenfalas kaj vundiĝis. Poste aliaj provis denove kaj ree vane, ĝis fine oni forlasis la intencon. J. J. Danholz rakontas pri babela turo de negroj el germana okcidenta Afriko, kiel la homoj foje volis surpervenki dion kaj konstruis pro tio altan turon; sed la kreinto Kyumbi rimarkis tiun provon kaj per tertremo detruis la turon kune kun la homoj. a. d. In.

— Ni kunvenis en tabakvendejo, mi kaj Gajvang. Ni estas treege ĝentilaj reciproke. — Ĉu vi ne deziras cigaron? mi demandas lin. — Ne. Vi scias ja bone, ke mi ne fumas. — Sed permesu! Vi ne rifuzos ja kaj ion elektos ĉi tie! — Nu, se nepre devas esti, diras Gajvang, do aĉetu al mi unukronan poŝtmarkon.

— Du amikoj renkontiĝis en poŝtoŝtorejo. La unua demandas: Kion vi faras ĉi tie? Ĉu vi venis por preni monon, kiu venis por vi? — Ne tion, sed mankas inko en mia fontoplumo.

— Ĉu la patrino ne kolektis pro tio, ke vi venis hejmen malfrue? — Ŝi ne scias tion, ŝi ne estis jam reveninta. Kaj kion diris la patro? — Tiu estis treege kontenta, ke ŝi ne jam estis hejme, ĉar li mem venis nur matene.

Malnovaj ĉeĥaj esperanto-gazetoj serĉataj:

La Kulturo jaro I nroj 1—5. Český esperantista, jaroj I—III kaj V. Sciigu prezon aŭ kion vi deziras interŝanĝe. Mi havas ankaŭ intereson pri ĉiuj malnovaj esperantaj eldonaĵoj, precipe ĉeĥaj.

O. Ginz, Praha II., Stárkova 4.

POR LOĜADO EN LUHAČOVICE

oni rekomendas vilaon

ČECHIE,

kies posedanto estas UEA-ano kaj ĈAE-ano. Abonantoj de Progreso havas rabaton. Demandojn adresu: Vila Čechie, Luhačovice.

EL ESPERANTO-MONDO

VOJAGO AL LA XXIV-a.

Speciala vagonaro al Parizo el Praha.

La fervoja direkcio konfirmis al ĈAE, ke estas komencitaj preparoj por ekspedo de la speciala vagonaro kaj promesis, ke ĝi tuj entreprenos vastan propagandon por partopreno ankaŭ inter neesperantista publiko. Estis interkonsentitaj la jenaj detaloj:

La vagonaro foriros el Praha, stacidomo de Wilson, vendrede la 29-an de julio proksimume je la 15-a horo. Ĝi venos al Parizo sabate en ĝusta tempo por ebligi partoprenon en la Interkonatiĝa festo.

Foriro el Parizo sabate la 6-an de aŭgusto post tagmeze, reveno al Praha dimanĉe vespere.

Por la rapidvagonaraj vojaĝoj el Praha al Parizo kaj returne al Praha, por manĝo kaj loĝado dum tuta daŭro kaj por asekuro kontraŭ akcidento pagos ĉiu vojaĝanto Kč 1200.— aŭ 36 usonajn dolarojn. Pro multaj demandoj venantaj ni atentigas, ke ĉiu partoprenanto devas uzi ĉi tiun specialan vagonaron ankaŭ por la reveturo kaj ke la bileto devas esti aĉetita komplete (kun manĝo, loĝado kaj asekuro).

Kongresanoj loĝantaj ekster Praha, ankaŭ eksterlandanoj, veturantaj al Praha por atingi la specialan vagonaron, ricevos 33% rabaton sur ĉeĥoslovakaj fervojoj. Estas necesa speciala rabatiĝo, kiun ni sendos al ĉiu deziranto por Kč 750. Al via mendo aldonu vian kongresan legitimacion.

Kongresan kotizon francajn frankojn 125.— sendu senprokraste al XXIV-a Kongreso de Esperanto, la Maison de la Mutualité, 24, rue St. Victor, Paris V per helpo de iu banko vialoka. ĈAE estas preta sendi vian kotizon kaj annci vian aliĝon post ricevo de Kč 176.50.

Pasporton validan devas havi ĉiu partoprenanto, vizon ne bezonas ĉeĥoslovakoj.

Eksterlandanoj veturantaj al Parizo tra ĉeĥoslovakio rajtas ricevi senpagan vizon ĉeĥoslovakon, laŭ la dekreto nro 36.218 de 12. IV. 32.

Estas necesa plej rapida aliĝo por garanti la ekspedon de la vagonaro. Skribu tuj al la adreso: s-ro O. Ginz por ĈAE, Praha II., Stárkova 4 kaj sendu la necesan sumon (Kč 1200.— por speciala vagonaro, eventuale ankaŭ Kč 750 por rabatiĝo kaj Kč 176.50 por kongresa kotizo) per bankopagiĝo aĉetebla en ĉiu ĉeĥoslovaka poŝtoŝtorejo al la poŝtsparkasa konto Otto Ginz, Praha, nro 94.796 Praha. Al

via korespondado aldonu afrankon por respondo.

Kiu havas la ebロン, ne preterlasu la okazon partopreni en nia nunjara manifestado. La supre aludita speciala vagonaro ebligas oportunan kaj malmultekostan viziton de la Urbo de Lumo, nia nunjara kongresurbo.

Ĉiu ĉeĥoslovaka partoprenanto en la komuna vojaĝo rajtas kunporti Kĉ 1000.—, kio kompreneble abunde sufiĉas, ĉar la ĉefaj elspezoj: fervojo, loĝado kaj manĝo (sen trinko) estas antaŭpagitaj. O. Ginz.

Rozo „Esperanto“.

Nia artikolo pri tiu rozo kaj pri la rozplantejoj de Jan Böhм en Blatná estis represita en multaj gazetoj ĉeĥoslovakaj kaj per helpo de ICK en la plejparto de esperanta gazetaro. Krome sendis al ni niaj eksterlandaj amikoj jenajn nacilingvajn gazetojn, kie ili publikigis tradukon de tiu artikolo: svedan Sparvägsmännens Tidning nro 2/1932, la nederlandajn De Morgen de 5. I. kaj De Zuidwillemswaard de 6. I. kaj la ampleksan (200 paĝan) numeron de japana Noogjoo to Engei (Terkulturo kaj ĝardenkulturo) nro 3 de marto 1932. — Estis eldonita triokolora glumarko pri la Esperanto-rozo. Jan Böhм, posedanto de rozplantejoj en Blatná, sendas ĝin senpage al ĉiu petanto.

Esperanto — kongresa lingvo.

La 20. — 26. Septembro 1932 okazos en Brno la V. Internacia seksologia kongreso. Inter la kongreslingvoj estas esperanto. La unuajn tradukojn E. Kl. Brno jam liveris al la kongresa sekretario Dro Weisskopf en Brno.

Regulaj radio-disaŭdigoj esperantaj en Brno.

Depost la 31. Majo 1932 regule ĉiumarde de la 18 h ĝis 18.15 h okazas esperantaj radioparoladoj, entute 5-6. Ĉefan tekston liveras Radio-journal mem al S-ino Strejčková kaj S-ro Baďura. La unuaj du paroladoj temis pri Ĉeĥoslovakio (S-ino Strejčková), la tria 14. Junio pri „Gimnastiko kaj sporto en ĈSR“ (S-ro B.)

Sokola kongreso.

La Esperantista Klubo en Praha aranĝas marde la 5. Julio specialan kunvenon en sia ejo (kafejo Louvre, Národní, 20), por kunveni kun la esperantistaj partoprenantoj de la Sokola kongreso. Ankaŭ la samideanoj de Praha estas petataj veni grandnombre. Komenco je la 20 h.

Regiona konferenco nordbohemia

okazas en Mladá Boleslav sabate kaj dimanĉe la 25—26 Junio 1932. Sabate amika kunveno, dimanĉe matene vizito de la urbo, je la 10-a horo laborkunsido, posttagmeze kunesto en la urba parko. Detalan programon vi ricevos aliĝante ĉe MUDr. Karel Marek, Mladá Boleslav.

LINGVA FAKO

Překlad 33. textu.

Překlady svoje k nahlédnutí zaslali nám: Baculík Ján Zv. Slatina, J. Hladký Karvinná, E. Janisch, Žižkov, V. Matouš České Budějovice, J. Mňáčko Tišnov, L. Novák Přívov, V. Rosypal, Háj, J. Sendzimir Mar. Hory, P. Šlechta Smolnice, A. Štěpán Hostivař, celkem 10 účastníků. Zdá se, že tentokráté dané thema odradilo některé dosavadní překladačské, ačkoliv není z nejobtížnějších. Zajímavé je, že zase naopak několik nových účastníků bylo jím přiváběno. Text sám po stránce překladačské je tak vděčný, že by byl zasluhoval větší účastí.

Z nejlepších překladů vylosována práce p. říd. uč. Aloise Štěpána v Hostivaři, který dostává knižní odměnu.

Gloraj viroj ĉeĥoslovakaj kaj esperanto.

Kiam nia movado estis en la komenco¹⁾, ĝi estis plejparte²⁾ rigardata³⁾ kiel utopia kaj tute ekster sfero de la tiam sciencula interesiĝo⁴⁾. Pro tio ĝi tre bonvenigis⁵⁾ vortojn de rekonco⁶⁾ de kiu ajn, kiu eminentiĝis⁷⁾ en iu fak⁸⁾ de la publika agado⁹⁾. Nun la sintenado¹⁰⁾ de la movado al la oficialaj aŭtoritatoj¹¹⁾ estas esence alia¹²⁾. Teoria konsento ne estas malofitaĵo, plivere¹³⁾ ĝi estas regulo. Ni ŝatas, sed ne trotaksas ĝin¹⁴⁾. Ni liveras al la samtempa civilizacio pozitivan elementon, ni estas ĝiaj membroj¹⁵⁾ kiel unu el memstaraj eroj¹⁶⁾ kies valoro fontas el ĝi mem¹⁷⁾. Pro tio konvenas¹⁸⁾ noti¹⁹⁾ ankaŭ la voĉojn de la gloraj viroj²⁰⁾, kiuj²¹⁾ estis malfavoraj al ni.

Poznámky.

1. přesně též: estis komenc(i)g)anta. Též: En la komenco, nia movado... Kiam ĝi komencis (rozumi se: sian ekziston) nebo Kiam ĝi komencigis je přesně vzařo: Když... (se) naše hnutí začalo.

2. většinou=plejparte, grandparte.

3. býti pokládán za = est(i) rigardata kiel, konsiderata kiel, opiniata (s 1. p.) Li konsideras sijn kiel kompetentulon. Se iu societo ne res-

pondis ĝis la fiksita tempo, ĝi estis konsiderata kiel akceptinta. Longa konsidero savas de sufero. (Z.) Li fine konsentis post mallonga konsidero. — Taksu iun ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia merito. (Z.) Ne taksu vian kontraŭulon tro malforta (=nepodceŭjite...) Oni devas nek subtaksi nek trotaksi la rolon de la sentoj. — Mi opinias tiun ideon ĝusta. Ili estis opiniataj fidindaj.

4. scienca intereso.

5. estis por ĝi tre bonvenaj, estis al ĝi tre agrablaj.

6. uznávati, uznati = rekonu. Li sendispute rekonis sian kulpon. Multaj internaciaj asocioj jam rekonis esperanton. Estas fakta vero, nun de ĉiuj rekonita. State rekonita institucio. Lia sinofera laboro ne trovis rekonon en la publiko.

7. ĝloriĝis, famiĝis, fariĝis rimarkindaj.

8. téz: obor (=pole) kampo. Kampo de laboro, aktiveco. La kampo de la historio prezentas multajn enigmojn.

9. aktiveco.

10. rilato al, staro al, vidpunkto pri

11. aŭtoritatuloj

12. estas ŝanĝita, e. ŝanĝiginta, esence ŝanĝiĝis. Méné vhodné: e. aliformigita, e. alikiĝita.

13. ĝi estas preskaŭ regulo. Nikoliv: pli frue (=dříve). Též zde nikoli „plí eble“.

14. To jest: ni alte taksas ĝian valoron (=šatas), sed ne taksas ĝin nemeritite alte (=ne trotaksas) Viz též pozn. 3. — Též ovšem v trpném způsobu: Ĝi estas ŝatata de ni...

15. Jsme v ni včleněni=jsme jejími členy. Též snad: Ni estas enigitaj en ĝi(n). Srovnejte hořejší překlad: „Ni estas ĝiaj membroj“ s překlady: Ni estas en ĝi enartikiĝitaj, enmembriĝintaj, enviciĝitaj. O jak málo je hořejší překlad snad méně doslovný, ale přece plně vyjadřující myšlenku a zároveň prostý.

16. partoj. Nikoliv: konsisto (=složení).

17. devenas el ĝi mem, estas en ĝi mem; venas de ĝi mem.

18. estas konvene. Někdy i: estas uřile, laŭcele, taŭge, taŭgas.

19. registri.

20. eminentuloj.

21. chceme-li vyjádřiti přesně: hlasy, mužů, které byly nepřiznivé: notí vočovj de la gloraj viroj, vočovj, kiuj estis malfavoraj. Nebo: konvenas noti ankaŭ la malfavorajn vočovj de gloraj viroj.

Příklady vzaty jsou většinou ze SAT-vortaro (Plena vortaro de esperanto). hm.

34. TEXT K PŘEKLADU.

Občanská rovnost, to jest rovnost před právem, jest žádoucí a možná. Ale rovnost vnitřní hodnoty lidí jest nemožná. Nikdy si nebudou lidé rovni vědomostní a povahou. Pokrok jest však možný jen snahou o nejvyšší dokonalost. Příležitosti ke vzdělání třeba poskytnouti všem. Všechno třeba vynaložiti, aby pokud možná byl nejvýše vyzvednut hospodářský, rozumový a mravní stupeň nejširších vrstev. (Em. Svoboda)

Přeložte a zašlete nám tento text. Překlady, které nás dojdou do 15. srpna budou vzaty v úvahu při slosování knižní odměny za nejlepší práci. Účastněte se hojně!

REDAKCIA

Pro la abunda materialo pri la kongreso de Olomouc ni devis aldoni kvar pliajn paĝojn kaj krom tio ellasi multon da alia materialo.

Ĉar en julio kaj aŭgusto La Progreso ne aperas, la sekvan ta n-ro aperos nur en septembro. Bv. atentigi tion kaj ne postuli la numerojn. Personojn, kiuj ŝuldas abonon, ni petas, ke ili paĝu tuj post ricevo de tiu ĉi n-ro.

UTILA ARANĜO.

Ni uzas la okazon por atentigi nian legataron pri la nova etika agado en Praha; la eksterlandaj gazetoj jam atentis ĝin kaj estos nur utile, se niaj adeptoj scios pri ĝi, por povi kontentigi tiusencajn demandojn de fremdaj gastoj venantaj al Praha.

Temas pri abstinencaj, vegetaraj kaj eŭbotikaj entreprenoj. Ilin ŝatos personoj, kiuj deziras sidi en senfumaj ejoj, trinki senalkoholajn trinkaĵojn, manĝi sen viando, havi legomajn manĝojn, kiuj estas tiel maloftaj en restoracioj de Praha, personoj kiuj ne deziras perdi tempon per sencela babilado. En ili logas vin absoluta pureco, rapida servado de trege variaj manĝaĵoj, forigo de trinkmono k. m. a.

Nunjare nova entrepreno estis aranĝita: restoracio de Ženský domov (Virina Hejmo), kiu sub gvidado de la konata propagandisto de vegetarismo sro Emanuel Voňka sukcese evoluas kaj jam nun estas unikaĵo de sia speco.

Ankaŭ la gimnasta societo „Sokol“ dum la ĉijara Sokola Kongreso subtenas la abstinencan tre efike: Unu el la plej belaj standoj en la Sokola Stadjo, en la prezidenta tribuno, ĝi pruntis al Ĉs. societo de abstinoj. Sokoloj vizitu ĝin kaj komparu!

— La higienaj restoracioj de Voňka troviĝas en Praha-I. Revoluční 7, — Vinohrady, Mírové nám. 10, — Ženský domov, Smíchov, Divišova.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA XIX. URALSKÉ NÁM. 447.

NUMERO 46. - JUNIO 1932.

KUNSIDOJ DE LA V. ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO.

SOLENA MALFERMA KUNVENO.

DIMANĈON, LA 15.-an DE MAJO, EN HALO DE ĈOB.

Post kanto de la himno Ant. Kudela, prezidanto de Loka Kongresa Komitato malfermas je la 10.15 h la kongreson salutante kore ĉiujn ĉeestantojn kaj inter ili precipe la fremdlandajn gastojn: Profesoron kuraciston Abe el Mukden (japanon), ĵurnalistinon Martha Root el New York kaj ĵurnaliston F. A. Kluss el Detroit. Li petas, ke oni permesu, ke la unuan parolon havu la unua aliĝinto al la kongreso Luĉjo Neoral, kvar kaj duon-jara esperantisto. La juna knabo veninte estradon alparolas kongreson en versoj, kiuj estas tre aplaudataj. Poste Kudela petas la kongreson proponi al si estraron. Jos. Friedrich (Košice) proponas elekti: Kiel honoran prezidanton Ant. Kudela, kiel prezidantojn Dr. Stan. Kamaryt kaj Ing. G. Scholze, vicprezidantojn O. Skleněka (Hradec Králové), R. Horn (Krnov), Jar. Mastný (Olomouc), sekretariojn B. Pittner (Olomouc), O. Ginz (Praha), protokolistojn: Anna Tarantíková, (Praha), Fr. Heikenwälder (Prostějov). Estis ĉiuvoĉe akceptite.

Prez. Dr. Stan. Kamaryt dankas je nomo de la tuta kongresa estraro pro la elekto kaj salutas ĉeestantajn reprezentantojn de la publikaj aŭtoritatoj kaj eksteresperantistaj korporacioj:

Urba konsilantaro de Olomouc (direktoro de burĝa lernejo Procházka).

Komandejo de la 7-a divizio (kapitano J. Bunínek).

Komerca ĉambro de Olomouc (F. Šimek).

Komerca gremio de Olomouc (Jar. Mastný).

Societo de ĉsl. mezlernejaj oficistoj fervojaj (M. Král).

Societo de ĉsl. fervojaj oficistoj (Schauhuber). Svaz junáků skautů (R. Sazák).

Dir. Procházka alparolas ĉeflingve la kongreson je nomo de la urbo kaj esprimas konvinkon pri fina venko de la esperantisma idealo, kiu valoras samtempe praktike kaj ideale. La prezidanto dankas lin pro tiu deklaro kaj insistas pri graveco de logika pensmaniero, kiu sola povebligas progreson de la civilizacio.

Salutparoladoj de esperantistoj: Dr. Abe, japano el Mukden, informas pri movado en Japanujo, Japana esperanto-asocio havas nun jam 47.000 anojn, esp-o estas instruata en pluraj lernejoj oficiale.

Martha Root, usonaniĉino el New York, insistas pri interna ideo de esperantismo kaj pri bahaismo. Si rememorigas sian interparolon kun prez. Masaryk pri esperanto.

Mikšová por Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esp-istoj.

Dandová por Ligo de katolikaj esp-istoj en CSR. —

Krom la du cititaj societoj estis ankoraŭ reprezentitaj de B. Poděbrad Skolta Esperantista Ligo en CSR kaj Skolta esperantista Ligo por Hungario.

Salulfletoj

legitaj de sekretario Pittner venis de:

Estraro de ministraro, ministerioj de fervojoj, eksterlanda, komerca, lerneja (ĉiuj senkulpiĝas sin pro nesendo de delegito kaj deziras al kongresaj laboroj la plej grandan sukceson). Direkcio de fervojoj, Landaj entreprenoj, Unio de fervojistoj, Distrikta komitato de reprezentantoj ĉe la fervoja direkcio. Lerneja inspektoro R. Pelíšek, en Olomouc.

Internacia Centra Komitato de Esperanto-movado (Ĝia konsilanto Hromada komisiita de ĝi saluti kongreson persone, ne povis veni estante malsana. Post lego de lia leteroj la kongreso akceptis proponon de la prezidanto sendi al li salutan leteron). Unversala Esperanto Asocio. Naciaj societoj Aŭstria, Brita, Flandra, Germana, Japana (instituto), Finlanda. Ĉsl. Esperanto-Instituto. E. Klubo en Liberec, Plzeň. Turisma Asocio Instruista en Kutná Hora.

Samideanoj Wiczorek kaj Jurowský (Ratibor) Jak. Robinson (Sambor), Ĉejka, Fridrich, Supichová, Pítlík, Mersič, Dolák, Bakalář-Srbecký, Bloch, Grauerová, Veverka.

Dum leĝado de la salulfletoj venis en kongresejon la urbestro Dr. R. Fischer. Prez. Kamaryt alparolis lin ĉeflingve. Li dankis al li pro la protektorato kiu la urbo Olomouc akceptis kaj atentigis pri la ĝenerala ŝato, kiu

estas ligita kun la nomo de nuna urbestro de Olomouc en la tuta respubliko.

Prez. Kamaryt proponas en nomo de la estraro kongresa sendi al prezidento Masaryk salutan telegramon. Li informas, ke saluttelegramoj senditaj de la ambaŭ antaŭaj kongresoj estis responditaj. Akceptita kun granda aplaŭdo. Teksto de la telegramo estis: Pan president republiky v Praze. V. sjezd ceskoslovenskych esperantistu v Olomouci pozdravuje Vas utivě. Za predsednictvo Kudela, Olomouc.

Sekr. Pittner informas pri la teknika aranĝo de la kongreso kaj pri nombro de la kongresanoj. Laŭ ĝi estas la kvina kongreso la plej granda el la ĝisnunaj (Vidu aliloke!)

O. Ginz uzas la okazon por informi pri speciala vagonaro irona al pariza kongreso. La vagonaro iros antaŭ la kongreso, la vojaĝo daŭros ĉirkaŭ 8 tagojn kaj kostos kun loĝejoj kaj manĝoj sume 1200 Kč. Krom tio la vojaĝanto rajtos kumpreni mil kronojn. La detaloj estos donitaj pli poste de la Asocio.

Programo de la debatoj.

Prez. Kamaryt atentigas, ke ĉiu kongresano ricevis en la kongresa dokumentaro ciklostilitan programon de kongresa agado, tre detalan. Li rekomendas al ĉiu kongresano obei la konsilon, per kiu la programo komencas. Legi atentig ĉiujn punktojn kaj annci sin ĉe la estraro kongresa por diri siajn spertojn kaj proponojn pri la koncernaj punktoj diskutotaj. Tiel oni plej rapide kaj plej sisteme venos al celo de la kongreso, ke la gvidantaj personoj de la movado aŭdu opiniojn de la kongresanoj pri la aktualaj taskoj de la movado kaj la kongresanoj aŭdos la vidmanierojn de la gvidantoj. Tiamaniere oni traktos en ambaŭ laborkunvenoj. En tiu ĉi kunveno la prezidanto laŭtlege tekstojn de la rezolucioj, kiujn redaktis komuna kunveno de GEL- kaj CAE-komitatoj okazinta hodiaŭ je la oka horo. La rezolucioj adresitaj al estraro de ministraro, ministerioj lerneja, fervojista, poŝtista, kaj al Radio-Jurnalo estis atentig aŭskultataj. La prezidanto petas, ke la kongresanoj pripensu la tekstojn, pridiskutu la eventualajn kompletigojn kaj plibonigojn kaj proponu ilin. En fino de la lasta laborkunveno oni diskutos pri la rezolucioj kaj voĉdonos ilin.

Fermo de la kunsido je 11.45 h.

I-a LABORKUNVENO

DIMANĈON la 15-an DE MAJO EN HALO DE ĈOB.

Prezidanto Kamaryt malfermas je 15-a horo la

diskutojn atentigante pri la punktoj de la programo.

Ĝenerala propagando.

Pri Interesigo de la ekstera publiko J. Sustr en la enkonduka klarigo insistas pri bezono atentigi la novan situacion kaj aliri la publikon per modernaj metodoj kaj iloj. Se oni jam sukcesis vekii la intereson, oni nepre tuj komencu publikan kurson. Por ĉiu situacio taŭgas alia ilo propaganda. Hoffner (Brno) pensas, ke grave estas vigligi la malnovajn esp-istojn, malaperado de estintaj aktivuloj estas granda perdo por la movado. Utile estus scii, kiom da esp-istoj estas ĉe ni. Sklenčka taksas la nombron laŭ diversaj helpiloj je 5000; sed li ne povas diri la kialojn por tiu ĉi nombro; ĝi ja estas konjekto. L. Krysta pensas, ke tre utila metodo estus kolekti subskribojn de gepatroj por enkonduko de esp-o en lernejojn. La subskriba agitado de virinoj por la Senarmiga konferenco ĵus okazanta en Genevo estas tre impona. Ginz: La konferenco tamen neniel respektris tiun entreprenon spite granda reklamo por ĝi farita. Jančařík trovas prelegojn kaj ekspoziciojn pri esp-o nerekomendindaj, ĉar ili estas jam tro malnovmodaj; kurson oni ne devas komenci tro baldaŭ, malhelpo estas ankaŭ maloftaj kontaktoj inter samideanoj kaj inter grupoj diverslokaj: eble utilu vesperetoj kun esperantlingvaj teatraĵetoj. Flugfolio Pojítko de CAE, varba broŝureto Weltsprache Esperanto de GEL, ŝlosiloj. La „Pojítko“ estis disdonita inter kongresa dokumentaro al ĉiuj kongresanoj, ĉar sperto montris, ke kelkaj samideanoj eĉ ne vidis ankoraŭ tiun ĉi propagandilon aperintan jam en la 7-a eldono. V. Ečhtner rekomendus, ke la propagandiloj aperu en pli moderna tipografia aranĝo. Ŝlosiloj ŝajnas al li tro karaj por esti propagandiloj.

Komuna afiŝo pendigebla en publikaj ejoj. Prez. Scholze informas pri tre bonaj spertoj, kiujn GEL havas pri tiaj afiŝoj; afiŝo unufoje lokita efikas daŭre kaj senpage Ginz montras la specimenojn de tiuj afiŝoj ĵus preparataj de CAE kun ĉeĥa kaj slovaka tekstoj kaj rekomendas oftan uzon de ili. Kamaryt dankas al GEL pro senpaga disponigo de la aŭtoraj rajtoj al CAE.

Eblecoj kaj rezultoj de laboro de unuopulo. Sustr esprimas sian konvinkon, ke rezultoj de laboro de unuopulo povas esti daŭraj nur, se ili estas apogitaj sur iu unuigo aŭ korporacio. Ečhtner akcentas, ke ankaŭ

rilato inter diversaj societoj kaj organizoj estas necesa.

Manko de mono por propagando. Pri tiu ĉi punkto malgraŭ oftaj plendoj en priorganiza korespondado ne estis diritaj spertoj aŭ proponoj de la kongresanoj. Nur la prez. esprimis sian konvinkon, ke la propaganda laboro devas esti organizata tiamaniere, ke ĝi almenaŭ parte pagu sin mem. La kotizoj postulataj ne devas esti sub certa nivelo; ĉar kotizon oni dece rajtas postuli nur de persono pagokapabla, postuli aŭ ellogi eĉ de homo tute malriĉa ian minimuman kotizon estas kontraŭ bonaj moroj kaj kontraŭ justeco; la malriĉuloj rajtas esti senpagaj anoj.

Publikaj kursoj. H. Popper informas pri la bonaj spertoj, kiujn li havis pri la Cseh-metodo kaj dum vizito en la Esperanto-domo en Arnhem. La granda avantaĝo de tiu metodo estas en tio, ke la kursanoj ne estas devigitaj ion ajn lerni hejme, sed ĉio estas instruata en la kursaj lecionoj; tial ili neniam timas veni en la kurson, ĉar ne povas okazi, ke oni venu kun ia nebone aŭ tute ne farita tasko. Jehlička konfirmas la bonegan impreson de la Cseh-metodo: li spertis ĝin en Kraków. Staněk rekomendas akcenti pli ol kutime en la kursoj la ideologian flankon de esperantismo. Kamaryt trovas nepre necese konservi adresojn de ĉiuj interesigintoj pri movado, precipe de ĉiuj eĉ komencintaj kursanoj; impreson, ke la movado vivas, povas tiaj homoj ricevi nur, se oni sendas al ili de tempo al tempo diversajn alvokojn; tion povas fari sole la naciaj propagandaj centroj; tial devas tiuj adresoj resti ĉe ili.

Instruado en publikaj lernejoj.

La prezidaton transprenas inĝ. Scholze.

Kamaryt informas, ke la ĝisnunaj permesoj instrui oficiale en lernejoj ne estas uzataj sufiĉe intense; memkompreneble la lernejoj aŭtoritatoj postulas plenumon de diversaj formalaĵoj ne ĉiam facile plenumeblaj. Sed, ke ili estas plenumeblaj montras la sperto, ke oni tamen ie instruas oficiale. Se estas ie malfacilaĵoj teknikaj estas tre konsilinde diri ilin tuj nun aŭ informi la Asocion, kiu plurfoje povis interveni sukcese. Gravan signifon havas favora decido pri esperanto en reforma komisiono por burĝaj lernejoj. Pri ĉiuj niaj postuloj koncernantaj lernejon estas parolate en la rezolucio legita antaŭtagmeze. Neužil havas tre bonajn spertojn instruante esp-on en sia unuagrada lernejo en Neředín. La instruado tre plaĉas al la gepatroj, kiuj mem postulas, ke iliaj infanoj

estu instruataj; tiam la permeso estas facile ricevata. Heikenwälder rekomendas diskonigi la metodon de Neužil. Strejčková rekomendas al instruistaro pli da idealismo, Hoffner volus pli intensan influadon je ministerioj kaj ceteraj publikaj aŭtoritatoj. Kamaryt diras, ke laŭ lia takso oni faras en tiu sfero la eblon. Neužil atentigas pri TAGE kaj invitas interesatojn en sian lernejon por montri al ili sian instrumentodon. Pri surprograma demando „Kial pluraj ekzamenitaj instruistoj eĉ ne provas instrui en publika lernejo?“ neniu el la kongresanoj diris sperton aŭ proponon. La prezidaton reprenas Kamaryt.

Propagando per gazetoj.

O. Ginz atentigas pri rimarkindaj rezultatoj atingitaj kaj insistas pri bezono, ke oni sendu al la gazetara servo ĉiujn atingeblajn eltranĉaĵojn. Laŭ liaj spertoj multe pli efikas en gazeto artikoleto mencianta iel esp-on aŭ informanta pri ia nia akiraĵo, se ĝi estas inter la cetera gazeta teksto ol se ĝi estas en speciala esp-o-rubriko. La kolekto de eltranĉaĵoj el jaroj 1931 kaj 32 estis disponigita al kongresanoj kaj ĝenerale plaĉis.

Propagando laŭ fakoj.

Pri studentoj informas Staněk: estas tute specialaj malfacilaĵoj de disvolvigo de propagando inter studentaro. Multaj studentoj estas tro malriĉaj, multaj tro fakulemaj por esti atingeblaj de niaj alvokoj. Grave estas atentigi la studentojn pri lektorato en Praha. Skoltoj. La prezidanto insistas pri graveco de laborado en tiu ĉi movado, kies fina celo estas tre simila al la nia. Buhř diras, ke la gvidantaro de skoltoj ĉe ni estas favora al esp-o, sed estas ĝis nun tro malmultaj esp-istoj inter skoltoj.

Blinduloj. V. Echnner informas pri granda amplekso de esp-o-instruado inter ĉsl blinduloj. Sklenčka aldonas, ke la multjara prez. de la klubo en Hradec Králové s-ro Snajberk estas militblindulo kaj organizas per esp-o militblindulojn.

Fervojistoj-Postistoj. Estis diritaj nek spertoj nek proponoj.

Radio.

Ginz insistas pri bezono de daŭra intereso de esp-istoj-aŭskultantoj pri la esperantlingvaj paroladoj. La parolantoj nepre informu lin, kiel membron de I. Radio-Komisiono, kiu ebligas ne sole rapidan informon de aŭskultantoj,

sed ankaŭ organizon de sendado de leteroj al la koncernaj stacioj. La enlandaj aŭskultantoj ankaŭ skribu al Radio-jurnalo, sed nacilingve. Strejčková informas, ke post sukceso de ŝia prelego pri soka kongreso stacio en Brno decidis enmeti esperantlingvajn prelegojn regule en la programon unufoje dum semajno. M. Root raportas pri siaj ĝenerale bonaj spertoj ĉe dissendaj radio-stacioj ekz. en Honolulu. Buhr trovas grandan mankon en nereguleco de esperantlingvaj disaŭdigoj. Prez. Kamaryt atentigas, ke la laborado en radio-sfero postulas ankoraŭ pli ol alispeca nia laboro persistemon de la prelegantoj. Tial li proponas, ke la kongreso rezolucie danku al ĉiuj, kiuj ĝis nun levidis kursojn en ĉsl. radio-stacioj aŭ prelegis aŭ organizis prelegojn en aŭ pri esp-o. Sed laŭnome ni menciŭ samidearon E. Wanitsek (Bratislava), ĉar li unuan fojon sukcesis post fininta kurso daŭrigi en vico de esperantlingvaj prelegoj diverstemaj kaj sciis utiliĝi la akiritan materialon por plua propagando doninte ĝin komplete por dispono de nia organizo. La propono estis akceptita. Viaj spertoj pri varbitoj el radio-kursoj. Al tiu surprograma demando venis neniu respondo.

Turismo.

Stacidomaj tabuloj. Ĝinz informas, ke fervoja ministerio eldonis antaŭ kelke da jaroj dekretan permesantan, ke en ĉiu stacidomo povu esperantista grupo aŭ delegito elpendiĝi senpage tabulon informantan pri adresoj de lokaj institucioj esperantistaj. La permeso ne estis ĝis nun uzita. Por ke uzo de tiu permeso havu efektivan propagandan efikon, estas bezone, ke samtempe ekpendu kelkaj centoj de tiuj tabuloj. Tio ankaŭ ebligas, ke la tabuloj fabrikigitaj poĝrande estu malkaraj. ĈAE laŭ interkonsento kun GEL intencas nun fabrikigi ilin. Li montras modelon de grandeco kaj de teksto. Badura: por tabulo en stacidomo en Brno la klubo estas devigata pagi rimarkindan sumon. Ĝinz: certe ni bezonas rememorigi la dekretan al staciestroj, sed tio estos eble nur, kiam ni povos disponiĝi gravan kvanton de tabuloj al esp-istoj, por ke la petoj al la staciestroj venu grandnombre.

Ekspoziciado de esperantlingvaj turismaj presajoj en vojaĝoficejoj. Prez. Scholze tre rekomendas tiun ĉi metodon de propagando kaj samtempe helpilon al vojaĝantaj esp-istoj. La spertoj en diversaj germanlingvaj lokoj ekz. en Haida, estas tre kontentigaj.

Propagando por aliaj sistemoj de helpaj lingvoj.

Prez. Kamaryt atentigas pri nova vigleco de enlandaj occidentalistoj kaj pri provo propagandi ĉe ni Basic English. Tiu klopodado certe ne haltigos nian movadon, sed tamen ĝi estas neagraba. Iliaj propagandaj metodoj estas honorindaj ekskluzive pro sia antikveco. Estas certe, ke ili iam sukcesas detruŭ pozicion de ni akiritan, sed neniam trovi novajn adeptojn de ideo de la helpa lingvo internacia. Tial ni trovas utile admoni niajn amikojn, ke ili ne timu, ke nia movado fiaskos pro konkurenco de pluraj sistemoj. Pri sorto de nia problemo ne decidus gramatikaj detaloj, sed bezono daŭre uzadi la helpan lingvon. Al tiu ĉi sento eduki la homojn, tio estas ĉefa tasko de nia movado. Tiu tasko estas atingebla. Tial atingi ĝin dependas sole de ni.

Fino de la kunveno je la 18-a horo.

II-a LABORKUNVENO

LUNDON LA 16-an DE MAJO EN HALO DE COB.

La prezidanto Kamaryt malfermas la kunvenon je la 9.30 h.

Organizo.

Sklenĉka donas detalajn enkondukajn informojn por venonta diskuto: Celo de poresperanta laboro estas triopa: Varbado, Instruado, Praktika uzado de la lingvo. Zamenhof mem ne povis ankoraŭ doni iajn konsilojn pri organizo. Tiam ne estis aliaj esperantistoj ol la memlernintoj. La disvolvo de la movado montris nepran bezonon, ke eĉ pri instruado oni devas zorgi. Por ĉio ĉi nepra bezono estas organizo. Ĝi estas trigrada: loka grupo, nacia centro, internacia ligo de la naciaj centroj. La loka grupo devas zorgi pri persona varbado kaj pri instruado, la nacia centro devas disponiĝi propagandilojn, varbi per neindividua propagando furnita al kolektivo, aĝi kun publikjuraj kaj aliaj aŭtoritatoj. Krom tio devas esti organizita praktika uzado de la lingvo, kiun funkcion certe sendube tre kontentige plenumas UEA. Nuna organiza skemo ŝajnas esti ankoraŭ plene sufiĉanta. Aperas nun denove planoj pri reorganizado, ekz. broŝuro de Baghy; ili estas ĥimeraj neatentante la veran staton de la movado kaj de ĝiaj eblecoj. Karakterize estas ke ekz. Baghy neniam laboris praktike en la organizado t. e. en kolektado kaj konservado de membroj kaj enkasigado kaj administrado de iliaj kotizoj. Nuna tempo estas absolute netaŭga

por eksperimentoj pri ŝanĝado de la organiza skemo, ĉar la nuna epoko estas efektive kriza. Se oni postulas pluan unuecigon de la organizo, en nia lando oni eĉ povas vidi ekzemplon, ĉar kunlaborado de ĈAE, GEL kaj UEA estas preskaŭ ideala. Miraklojn oni atendis ne povas, ĉar la financaj eblecoj de la movado estas necese malgrandaj. Ne forgesu, ke ĉe ni estis en la pasinta jaro 1200 UEA-anoj, GEL-anoj iom pli ol 400 kaj ĈAE-anoj ne plenaj 400. Tiaj malgrandaj nombroj malkonsilas malgrandigi la kotizojn, ĉar tio signifus sole malaltigon de la enkasigataj sumoj, sed ne atentindan kreskon de la membraro. Grava malfacilaĵo konsistas en tio, ke estas tro da laboro, kiu devas esti efektivigata de negranda areto da bonvoluloj. Dungi salajratan kapablan oficiston ne estas ankoraŭ eble, ĉar li nepre bezonus oficejon taŭge ekipitan, por ke la laboro povu esti fruktodona. Grava manko de fervoro de multaj esp-istoj estas nesufiĉa persistemo; multaj komencante kun entuziasmo furora haltas ĉe la unua malhelpo. Certe ekzistas multaj esp-istoj ĉe ni, kiuj povus aliĝi al niaj organizoj kaj kiuj povus pagi. Tial estas bezone daŭre popularigi inter esp-istoj la konvinkon, ke la nuna socia ordo estas tia, ke ĉiu ideo, kiu volas esti respektata, devas esti apogita sur firma kaj potenca organizo. Tial rezultas unusola konsilo, kiu povas plibonigi la nunan staton: aliĝu kaj aliĝu!

Kudela deklaras opinion de si kaj de pluraj samideanoj el Olomouc, ke al movado helpus reorganizo, kiu enmetus ĉiujn sociojn naciajn kaj grupojn lokajn en UEA, kie ili daŭrus sub centra gvido kaj kontrolo kiel naciaj sekcioj. La militistaro bezonas unuecan komandon. Lia propono signifus koncentrigon de ĉiuj fortoj kaj ŝparon en administraj elspezoj. Estus unusola kotizo, kaj tio tre helpus por enkasigo. **L. Krysta**, prezidanto de Regiona Esperantista Ligo deklaras, ke tiu Ligo, kiel sekvas jam el la nomo mem, neniel intencas konkurenci al la oficialaj organizoj. La regiona limigo havas sole praktikajn kialojn kaj celojn.

Sklenĉka: Kompreneble ni neniam timis ian konkurencon de Rel. Mi mem iniciatis kaj efektivigis multajn regionajn kunvenojn, kiuj estis siatempo daŭra institucio.

Fousek ne konsentas kun s-ro Kudela, ke oni devus de ĉiu postuli ke li pagu kiel 100% esp-isto. La nuna aranĝo, laŭ kiu oni povas elekti tri aŭ kvar sumojn pagotajn anstataŭ la tuto, ŝajnas pli alloga por tiuj, kiuj ne povas aŭ ne volas pagi la kotizon por ĉiuj institucioj.

Jukl plene konsentas kun opinioj diritaj de Sklenĉka. Aranĝo, kiun akceptis la Klubo en Bratislava ŝajnas esti la plej taŭga solvo de la organiza „problemo.“ Estus utile, ke la ĈAE kaj GEL interkonsentu pri egaleco de la postulata kotizo. Tio tre simpligus aranĝon de kontoj en la kluboj diverslingvaj.

Raszk rekomendas, ke oni propagandu enkondukon de monkollektaj inter esp-istoj ĉe familiaj kaj aliaj festenoj.

Friedrich: Ĉiu devus kompreni neceson de organizo. Estas tre strange, ke rezolucio de la kongreso en Bratislava kaj ĝia renovigo en Teplice havis tiom malgrandan rezulton. Efikas certe konsternige, se ekz. en Plzeň estas sole 2 membroj de ĈAE. Li ne rekomendas bazi la buĝetojn sur donacoj. Sed oni povus provi lasi la 16 Kč por unuopuloj kaj por membroj pere de kluboj postuli sole 10 aŭ 8 Kč.

Prez. Scholze informas pri nuna situacio ĉe Germana Esperanto Ligo. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi plene reorganizis kaj koncentrigis gvidadon de la movado. Ĉiuj lokaj kluboj estis nuliĝintaj kaj anstataŭ ili ekfunkciis nuraj lokaj grupoj de GEL. Ĉiu membro pagas per unu sola sumo (26 Kč po jare) la grupon, distriktan, ligan kotizon kaj la ligan gazetabonon. La kotizo estas dividata laŭ proporcio fiksita de la Ligo ĉefkunveno. La Ligo konsistas el unuopaj membroj kaj ĉiu kiu aliĝas al la grupo, per tio ankaŭ liganiĝas. Sed inverse ne ĉiu ligano devas esti grupano. La grupoj pligrandigas la procentan parton, kiun ili deprenas de la Ligo kotizo, per lokaj aranĝoj ekz. amuzoj, kursoj k. s. Tiu ĉi aranĝo kontentigas la liganojn.

Strejčková tute ne konsentus kun tia aranĝo, ĉar la loka klubo bezonas multan monon por siaj taskoj.

Breuer tre rekomendus, ke ideo de esperantismo estu kunligita kun pli alta grado de kamaradeca sento. Dum siaj vojaĝoj li ofte spertis, ke li ne estis akceptita en la kluboj tiom amike, kiom li atendis kaj kiel decus.

Jukl: Certe ne temas pri la Klubo en Bratislava, kie samideano Breuer estis akceptita same amike kiel la ceteraj novaj anoj. Tiel devus esti ĉie.

Uhrová insistas pri siaj spertoj, kiuj estas tute kontraŭaj al tiuj de Breuer. Ŝi mem plurfoje akceptis tute malriĉajn samideanojn kaj helpis al ili eĉ materie.

Sklenĉka resumante la diversajn opiniojn esprimatajn konstatas kun sincera kontento ĝenerale tre vivan intereson de kongresanoj pri progreso kaj prospero de organizo de nia movado. La taskoj al ĝi donataj estas malfacilaj

kaj povas esti plenumataj nur per komuna laboro, kiu nepre bezonas pluajn oferemajn kunlaborantojn.

Prez. Kamaryt proponas, ke la kongreso ne akceptu tiun ĉi fojon rezolucion pri organizo, sed ke ĝi unuanime rekomendu al esperantistoj legi, primediti kaj pridiskuti precipe en la klubaj kunvenoj la opiniojn difinitajn en debatoj dum la ambaŭ laborokunvenoj. — La propono estis ĉiuvoĉe akceptita.

Rezolucioj al publikaj aŭtoritatoj.

Prez. Kamaryt demandas, ĉu iu havas iun aldonon aŭ kompletigon por rezolucioj legitaj en la malferma kunveno. Ĉar neniu anoncas sin, li demandas, ĉu la kongreso akceptas ilin en la proponitaj tekstoj. Ĉiuj konsentas akklamacie. Neniu anoncis sin al la demando, ĉu iu estas kontraŭ. La prezidanto deklaras, ke la rezolucioj estis ĉiuvoĉe akceptitaj. Iliaj tekstoj en esperanta traduko estas jenaj:

Al estraro de ministraro:

La kongreso pritraktinte eblecojn, kiujn donus uzo de esperanto kaj de esperantista organizo por internacia politika propagando, por propagando turisma kaj komerca, en ekligo kaj konservado de kultura kontakto kun fremdlando, uzo en poŝtaj presaĵoj kaj en fervoja servo, trovas, ke ĝi estas uzata de niaj centraj aŭtoritatoj relative malmulte. Ĝi permesas do al si rekomendi, ke oni uzu ĝin pli ofte kaj ĝi rimarkigas aldone, ke niaj organizaĵoj estas pretaj disponigi al publikjuraj korporacioj siajn spertojn kaj siajn teknikajn eblojn, por ke uzo de nia tutmonda organizo por la cititaj celoj estu laŭeble plej laŭcela kaj sukcesa.

Al ministerio lerneja:

La kongreso aŭdinte raportojn de siaj fakuloj pri instruado de esperanto en lernejoj kaj ĝia situo en instruplanoj akceptis jenan rezolucion al ministerio lerneja:

1. Ĝi dankas pro la intereso, kiu estas daŭre videbla el diversaj agoj de la lerneja administraro kaj de instruistaro.

2. Kun kompleta rekono ĝi akceptas la sintenon de ministeria komisiono por reformo de la burĝaj lernejoj, laŭ kiu esperanto devas ricevi taŭgan lokon en reformitaj instruplanoj de tiuj lernejoj. Samtempe la kongreso permesas al si esprimi sian konvinkon, ke oni ne devus plu prokrasti la efektivecon de la reformo.

3. Kun bedaŭro la kongreso konstatas, ke la reforma komisiono por mezaj lernejoj en siaj

instruplanoj tute ne atentis esperanton. Atentigante pri la petskribo, kiun faris pri tiu ĉi afero Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, ni esprimas miron, kial ĝuste esperanto ne devas esti uzata por formala akriĝado de la intelekto. Nia miro estas samgrade rajtigita kiom miro de anglistoj. Iliajn argumentojn ni povus ripeti komplete.

4. Ni protestas kontraŭ ellaso de esperanto el instruplanoj de la komercaj akademioj apogante koncernan petskribon de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

5. Ni postulas, ke lektoroj de esperanto estu starigitaj ankaŭ en la altaj lernejoj ekster Praha.

Al ministerio fervoja:

La kongreso danke akceptas informon, ke ministerio en siaj propagandaj turismaj presaĵoj uzas ankaŭ esperanton. Pro sendube kontentigaj rezultoj, kiujn oni akiris, la kongreso rekomendas, ke oni restu ĉe tiu maniero daŭre. Samtempe ĝi permesas al si rekomendi al la ministerio pritrakti, ĉu jam nun oni ne devus provi uzi esperanton por informaj surskriboj en fervojaj domoj kaj veturiloj.

Ĉar ekzistas rimarkinda nombro da fervojoj sciantaj esperanton, estus en intereso de pli facila interkompreniĝo kun vojaĝantaj fremduloj, ke fervojistoj en stacidoma kaj vajonara servo sciantaj esperanton portu dum deĵorado esperantistan insignon. Tial ni permesas al ni proponi, ke oni rekomendu al ili per speciala dekreto tiun insignon porti.

Al ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj:

La kongreso atentigas ministerion de poŝtoj kaj telegrafoj pri la grandaj eblecoj kiujn donas ampleksa uzado de esperanto en disaŭdigoj destinitaj por fremdlando, precipe en dissendado mallongonda kaj permesas al si rekomendi, ke oni dece atentu ĉe internacia disaŭdigo prelegojn en esperanto kaj ke mallongonda stacio en Praha-Hloubětín enmetu en programon regulan dissendadon en esperanto.

Al Radio-Jurnalo en Praha:

La kongreso kun danko konsciiĝas, ke el la ĉeĥoslovakaj stacioj estis dissendataj jam tri esperanto-kursoj, kaj ke de tempo al tempo estas dissendataj prelegoj en esperanto. Sed ĝi opinias, ke uzado de esp-^o estas ankoraŭ tro sporada por povi uzi la avantaĝojn, kiuj povus el ĝi rezulti. Tial ni rekomendas, ke oni enmetu en la programon tiujn prelegojn multe pli ofte kaj laŭ ebleco regule. Ĉar nia organizo havas

eblecon antaŭe atentigi pri tiuj prelegoj la aŭskultantojn en fremdlando, oni povus per taŭga aranĝo tre pligrandigi la propagandan valoron de la esperantlingvaj prelegoj.

Fermo de la kongreso.

H. Popper en varmaj vortoj dankas al la Loka Kongresa Komitato precipe al samideanoj Kudela, Neuzil, Masný, Pittner pro la oferemo, kun kiu ili preparis la kongreson kaj pro tre bona aranĝo, per kiu ili tre agrabligis al ni la kongresajn tagojn. (Granda aplaŭdo).

Prez. Kamaryt, dankas al ĉiuj kongresanoj pro vigla partopreno en la laboroj kaj pro ĝenerala intereso vidigata koncerne al plenumotaj taskoj kaj deklaras la kvinan kongreson finita je la 12.30 h.

Prezidis: Protokollis:

Kamaryt, Scholze. Tarantíková, Heikenwälder.

MOVADO EN ĈSR.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAĤA.

- 11./3. Stekr, Holub kaj Vráz.: S-ro, Sustr en longdaŭra parolado rememoris ĉiujn tri esploristojn, iliajn vivojn kaj verkojn. Plena kunveno montrigis dankema aŭskultanto.
- 1./4. Aprilo. Humora programo, pri kiu zorgis gesamideanoj: Staněk, Tarantíková, Louda kaj Sustr.
- 8./4. Sen debato kaj sen rimarko la kunveno akceptis informon de la komitato pri eksigo de s-o R. Bloch, Tiu ĉi sinjoro, iama funkciulo kluba, de certa tempo preferis apartiĝi antaŭaŭ kunlabori. Eksiginte el UEA kaj el ĈAE, sed restante ano de la Klubo li subite ekfunkciis kiel „Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha Ĉeĥoslovakio“. Oni multfoje amike konsilis al li ne fari tion kaj prefere kunlabori en iu el la organizoj. Ĉar li rifuzis, oni kelkfoje insistis, ke li por sia entrepreno elektu taŭgan nomon, kaj ne tian erariĝan titolon. Sed vane, Amasiĝis plendoj kontraŭ lia „Centro“, dokumentoj pri ĝia laboro kaj tial la komitato, estante de ĝenerala kunveno speciale komisiita solvi la maĝrablan aferon, post detala esploro de la afero eksigis s-on Bloch pro grava konduto kontraŭ esperanta disciplino. Vicklubestro s-o F. Staněk havis longan paroladon pri „Lingva historio de Esperanto“, kaj f-ino Tarantíková legas proprajn tradukojn el itala lingvo: D'Ami-

cis: La Monkolekto, Vivanti: La historio de Vivien.

- 15./4. Kunveno rememoris datrevenon de morto de nia Majstro. S-o F. Staněk prezentas sian replikon al la kontraŭesperanta artikolo en unu ĉeĥa gazeto.
- 29./4. Raportoj de estraro pri kongresaj preparoj en Olomouc. S-o Ehtner legas el Verda Biblio.
- 6./5. Kunvenon komune vizitis frekventantoj de finiĝanta Esperanto-kurso por komencantoj. Bonvenigis ilin klubestro Sustr, redaktoro Hromada parolis pri Progreso, Ginz pri Olomouc. Tiu ĉi kunvenon escepte oni kelkfoje parolis de prezida tablo ankaŭ ĉeĥe.
- 20./5. Membra kunveno de UEA. Al la kunveno estis invititaj de loka UEAdelegitaro ĉiu anoj de UEA el Praha. Ĉefdelegito Skleněka el Hradec Králové informas pri kriza stato de UEA. Debatu kaj elekto de nova delegitaro, kiu nun konsistas el jenaj samideanoj: Ĉefdelegito por Praha: Ginz, delegitoj: Sustr, Čánský, Votrubeč, Buhr, f-ino Rabi, Janda kaj Staněk Miloslav.
- Fine s-o Staněk amuzas ĉeestantojn per sia poemego plena da humorajoj pri konduto kaj aventuroj de Praha'aj samideanoj en Olomouc.
- 27./5. Interesa parolado de sekretario s-o J. Kieprlík pri Luzacio kaj Luzaciaj Serboj. Post mallonga debato rezultas propono ekriklari kun tiu ĉi forgesita slava gento kaj aranĝi en la Klubo Luzacian vesperon. — S-ro Louda legas sian longan artikolon pri okazonta Sokola kongreso kaj pri M. Tyrš. La artikolo aperis en Oomoto. — of.

Praha. La 20. Majo en Rondeto de Esp-istinoj parolis F-ino Supichová pri novaj lernejaj reformoj, pri IALA; kunlaborado kaj testado. Ĉeestis 15. p. jš.

Bratislava. Esperanto-Klubo aranĝis la 24. Aprilo ekskurson en kolonion Dornkappel al strato de Dro L. L. Zamenhof. Okazis fotografado de nombraj ĉeestantoj; venis ankaŭ reprezentantoj de la movado en Trnava. Novaj sukcesoj de esp-o vidiĝas en rondoj skoltaj kaj laboristaj. S-ano Macek gvidas regulan rubrikon en ĵurnalo Slovák. Al kongreso de Olomouc aliĝis 6 Bratislavanaj, nomo de la klubo estas enĉizita sur la memorbloko. Estis decidite, ke ĉiu regule paginta membro kluba fariĝos membro de ĈAE aŭ GEL je kostoj de la klubo. vj.

Bakov n. Jiz. La 1. de Majo okazis ĉi tie fonda kunveno de Esp. Klubo partoprenata de 20 p., el kiuj 5 el Mladá Boleslav, 2 el Nymburk, 1 el Josefův Důl-Kosmonosy. La kunveno malfermis S-ro Pytloun, en paroladoj partoprenis prof. Kožený, red. Reichelt kaj Dro Marek el Mladá Boleslav, S-roj Srb kaj Moc el Bakov kaj du gastoj el Nymburk. La kluba estraro estis elektita jene: Fr. Pytloun prez., V. Peroutka vicprez., Jos. Srb sekr., J. Puncman kas., Veselý Fr. kaj Moc St. revizoroj. S-ro Pytloun donacis al la klubo 50 Kč, kiujn li jam longan tempon kolektis por tiu celo. Venonta kunveno okazos en Mladá Boleslav, tempon anoncos lokaj jurnalaj. **fp.**

Bohumín. Dimanche la 8 Majo okazis ĉi tie kunveno de Silezia ligo, partoprenata de 54 gesamideanoj el 21 lokoj. S-ro ekslernejestro Adamek parolis pri la historio de la loka movado, kiun fondis (kiam?) per sia kurso S-ro Steiner, nun en Wien. Post la milito okazis kelke da kursoj, sekvis rondeto, kiu ekfloris post veno de s-ro trajnmanipulanto Raszka. Tiu propagandis inter fervojistoj, la lastan Cemetodan kurson partoprenis 26 fervojistoj. — En granda Ostrava oni deziras centriĝi kaj unueciĝi la movadon, „ĉar unu forta organizaĵo kapablas labori nekompareble pli efike kaj pli energie ol kelkaj sensignifaj rondetoj.“ — Gekursanoj deklamis poemojn. — S-ro Hladký atentigas pri krizo de UEA kaj proponas, ke Ligo aliĝu kiel MS; por tiu celo la kunveno kolektis 75 Kč. — Analizo de alportitaj tradukoj denove montris ĉiuf flankan utilon de la aranĝo. — S-ro lernejestro Skulina proponis, ke REL-anoj, alparolante unu la alian, uzadu la esprimojn frato kaj fratino. Estis decidite, ke oni restu ĉe „samideano.“ — S-ro Neděla informis, ke la projektata aŭtobusa ekskurso al la kongreso de Olomouc ne povos efektiviĝi pro malgranda intereso. **jh**

Mariánské Hory. En duono de Marto okazis ĉi tie parolado de S-ro Joz. Sendzimir „Pri ideo de int. lingvoj kaj pri E-o,“ kun samtempa malgranda ekspozicio. Ĉion aranĝis Pola Laborista Kulturĝimnasta asocio „Sila“ (Forfo).

Mariánské Hory. Fine de majo estis finita ĉi tie kurso por komencantoj. Aliĝis 11 p., finis 8 p. inter ili du polaj instruistoj, kiuj jam faras provinstruadon en lernejo. Kurso daŭris 10 semajnojn, gvidis ĝin S-ro Sendzimir. **sj.**

Mor. Ostrava. De la 15 Jan. ĝis 28. Majo daŭris kurso gvidata de S-ro Vl. Slaný. Aliĝis 12 p., finis 10 p. **sj.**

Uherský Ostroh. La 26. Aprilo okazis ĉi tie esperanto-vespero je memoro de Dro Zamenhof,

JAZYKOVÝ ODBOR SČE.

V ý z v a.

Ze zkušenosti víme, že mezi členy Svazu a čtenáři Progresu je mnoho samideánů, kteří roztroušeni, navzájem neznámi, nesoustavně a bez plánu věnují mnoho práce, času a námahy slovníkovým a mluvnickým pracem bez naděje, že výsledky své práce využijí pro veřejnost esperantskou. Spojití a seznámití navzájem tyto pracovníky, dáti jejich práci cíl, plán, usoustavnití a umožnití uveřejňování výsledků společné práce, aby nebyla vyplývána nadarmo, je účelem nově zakládaného jazykového odboru SČE. Zveme každého, kdo má chuť a schopnost dle sjednaných nebo daných pokynů pracovat na jazykových otázkách esperantských, aby se přihlásil za člena, s udáním v jakém směru chtěl by spolupracovat. Než se odbor ustaví, pište zatím na redakci. **R e d.**

sub protektorato de la Regiona Popolkultura Societo. La vesperon multnombre vizitis ne sole esp-istoj de la loko, sed ankaŭ de la malproksima ĉirkaŭaĵo. Antaŭ la programo, en kiu gajaj paroladoj altemis kun belegaj kantoj kaj poemoj, parolis s-ro Bartošik pri la vivo de nia Majstro. Ĉiuj ĉeestantoj disiris tre kontentaj pri la bele travivita vespero. —a—

Staré Město u Uherského Hradiště. La 12 Junio okazis ĉi tie unua esperanto-vespero kun ekspozicio. —k.

Kroměříž. La urba propolkleriga komitato (Městský osvětový sbor) eldonis en j. 1932 varban gvidfolion por la urbo, ĉeflingvan. Sur la dua paĝo de la kovrilo estas alvoko al vizito de la urbo en lingvoj franca, germana kaj angla, sur la lasta paĝo en esperanto. La broŝureto estas plaĉa, kun multaj bildoj.

Prostějov. Jara kunveno de la Klubo 27. IV. En la pasinta jaro okazis 2 kunvenoj komitataj kaj 26 klubaj. Nombro de membroj 34. Estis elektitaj: Fr. Heikenwälder prez., Ad. Malíček vicprez., St. Jeřábek protokolisto, A. Osizlý kasisto, A. Dolínek, M. Janečková, A. Hejbalová, A. Veselý komitatanoj. V. Kleiner, R. Müller revizoroj.

Slovník obchodně-technický, účetní a daňový. Sešit č. 1—3/V. obsahuje: Konstantní účetnictví - Konsulární poplatky - Konto u peněžního ústavu - Kontokorenty. Příloha: Slovník obchodních zkratk, výrazů, rčení a cizích slov od prof. Zástěry. Vydávají Tiskové podniky Ú. S. Č. P., Praha I., Masarykovo náměstí, 4. Cena sešitu Kč 19.50.

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze č. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.